

LA IMPERIO DE LA NEKROMANCIÛSTOJ



CLARK ASETON SMITH



La Imperio de la Nekromanciistoj

aŭtorita de

Clark Ashton Smith

tradukita de
Russ Williams

eldonita je
2016-10-24

Antaŭparolo

Traduko: Ĉi tiu traduko havas longan historion... Laŭ mia memoro, en 2003 aŭ 2004 Robert Read volis traduki kelkajn verkojn de Smith kaj petis mian kunlaboron kaj poste transdonis la aferon al mi. Ni ambaŭ estis entuziasmaj sed nespertaj komencantoj, do la rezulta traduko enhavis multajn lingvajn erarojn. Jardekon poste Ĝan Starling kontaktis min pri la traduko. Mi korektis erarojn kaj poluris la stilon. Mi ankaŭ ricevis tre utilajn komentojn de kelkaj provlegantoj kun aliaj denaskaj lingvoj ol la angla, Mariusz Hebdzyński, Anina Stecay, kaj Anna Skudlarska.

— Russ Williams

Vortaro: Vidante vorton ‘ĉi-aspektan’ (sen citiloj), ŝvebu super ĝi per fingropinto aŭ muso kaj ekvidu, ke ĝi ŝanĝiĝos por aspekti ‘tiel ĉi’. Per tio vi scios ke tiu vorto havas difinon en la provizita vortaro. Klaku ĝin por ekvidi ties difinon. Post legi la difinon, atentu pri la komenco-vorto de la difino, kiu aspektos kiel ‘**difin/o**’. Klaku tion por salti reire al la rakonto.

Se sur via aparato ligiloj ne aspektas kiel supere, tio rezultas de afero kie la niaj CSS-aj reguloj super-regiĝus fare de interna sistemo de via propra aparato: **Nook**, **Kobo**, **Kindle**, ktp. Do, substrekoj povas aperi *malgraŭ* niaj specifaj elektoj. Kulpigu la propran aparaton tiukaze.

Ni provis elekti mezan stilon post demandi ĉe Fejsbuko kaj alie pri diversaj personaj preferoj. Ni ja volas provizi elekton al ĉiu leganto. Bedaŭrinde, tio nuntempe ne eblas. Solvo devas atendi ĝis la plimulto el bitlibraj aparatoj subtenos la formaton **EPub 3**, kio permesos funkcion pri elekto inter stiloj pere de **JavaScript**. Sed **EPub 2**, per kio la plimulto el aparatoj ankoraŭ funkcias, ne ebligas tiajn elektojn.

Ni elektis difini nur la niaopinie maloftajn vortojn. Bonega helpo por esperantaj progresantoj, nur iometa helpo por komencantoj. Se viaopinie, plua vorto bezonas difinon, kontaktu nin, kaj ni aldonos.

Fine sciu, ke ajna leganto rajtas peti aldonon de plua difino en la vortaro.

Kontaktu la eldonejon epoŝte or sugesti pri tio.

Propraj Nomoj: Plejparte ni lasis, ke propraj nomoj restu kiel eble plej proksimaj al la originalo. Tamen, por eviti falsajn sufiksojn ‘-an’, ‘-os’ ktp, ni opiniis tion dece, ke ni faru necesajn ŝanĝetojn.

Angla Titolo: La anglalingva originalo titoliĝis kiel *The Empire of the Necromancers* kaj eldoniĝis unue en 1932. La versio, kiun ni sekvis en tradukado devenis el *A Vintage from Atlantis: Volume Three of the Collected Fantasies of Clark Ashton Smith*, 2007, ISBN 978-1-59780-030-3

La Imperio de la Nekromanciistoj

La legendo de Mmatmuoro kaj Sodosmo ekestos nur en la lastaj cikloj de Tero, kiam la ĝojaj legendoj de la prajaroj estos forgesitaj. Antaŭ la tempo de ĝia rakontado, multaj epokoj estos forpasintaj, kaj la maroj estos falintaj en siajn fundojn, kaj novaj kontinentoj naskiĝos. Eble, en tiu tago, ĝi servos por ĉarmi dum iom da tempo la nigran lacon de mortanta raso, senespera pri ĉio krom forgesiteco. Mi rakontas la legendon kiel viroj rakontos ĝin en Zotiko, la lasta kontinento, sub griza suno kaj tristaj ĉieloj, kie la steloj ekaperas en terura brileco antaŭ vespero.



Mmatmuoro kaj Sodosmo estis nekromanciistoj, kiuj venis de la malluma insulo Naato, por praktiki siajn sinistrajn artojn en Tinarato, trans la malkreskintaj maroj. Tamen ili ne prosperis en Tinarato: ĉar la popolo de tiu griza lando juĝis morton sankta; kaj la nenieco de la tombo ne estu facilanime malsanktigita; kaj la reanimigo de la mortintoj per nekromancio estis abomeninda.

Do, post mallonga tempo, Mmatmuoro kaj Sodosmo estis forpelitaj pro la kolero de la loĝantaro, kaj devis fuĝi al Cincoro, dezerto en la sudo, kies popolo konsistis nur el la ostoj kaj mumioj de raso, kiun la pesto mortigis en pasinta epoko.

La lando en kiun ili iris kuŝis morna kaj lepra kaj cindra sub la kolosa, arda suno. Ĝiaj dispeciĝantaj rokoj kaj mortaj sablaj solejoj terurus la korojn de ordinaraj viroj; kaj, ĉar ili ŝoviĝis en tiun malplenan lokon sen manĝaĵo, la sorto de la sorĉistoj ja eble ŝajnus senespera. Tamen, sekrete ridetantaj, kvazaŭ konkeristoj tretantaj la alirejon al longe prisopirata regno, Sodosmo kaj Mmatmuoro marŝadis en Cincoron.

Senrompe antaŭ ili, tra kampoj sen arboj kaj herboj, kaj trans kanaloj de sekiĝintaj riveroj, etendiĝis tiu granda ŝoseo, laŭ kiu antaŭe vojaĝantoj iris inter Cincoro kaj Tinarato. Tie ili renkontis nenian vivulon; tamen baldaŭ ili trovis la skeletojn de ĉevalo kaj ĝia rajdanto, kuŝantaj sur la vojo, ankoraŭ portantaj la riĉajn bridon kaj vestaĵon, kiujn ili portis vive. Mmatmuoro kaj Sodosmo paŭzis antaŭ la kompatindaj ostoj, sur kiuj eĉ ne makuleto de putraĵo restis; kaj ili ridetis fie unu al la alia.

“La ĉevalo apartenos al vi,” diris Mmatmuoro, “ĉar vi estas la iomete pli aĝa inter ni, kaj tial vi meritas; kaj la rajdisto servos nin ambaŭ kaj fariĝos la unua, kiu ĵuros servuton al ni en Cincoro.”

Tiam, en la cindra sablo apud la vojflanko, ili desegnis trioblan cirklon; kaj kunstarante ĉe ĝia centro, ili faris la abomenindajn ritojn, kiuj devigis mortintojn leviĝi el trankvila nenieco kaj obei ekde tiam, en ĉiuj aferoj, la malluman volon de nekromanciisto. Poste ili aspergis pinĉaĵon de magia pudro en la naztruojn de la viro kaj la ĉevalo; kaj la blankaj ostoj, lamente knarantaj, leviĝis de sia kuŝejo kaj stariĝis, pretaj por servi siajn mastrojn.

Do, laŭ la interkonsento, Sodosmo eksidis sur la skeleta ĉevalo kaj prenis la juvelajn rimenojn, kaj rajdis kiel malbona mokaĵo de Morto sur sia pala ĉevalo; dum Mmatmuoro pezpaŝadis flanke de li, apogante sin leĝere per ebena bastono; kaj la skeleto de la viro, kun sia riĉa vestaĵo malstrikte flirtanta, sekvis la du kiel servutulo.

Post ioma tempo, en la griza dezerto, ili trovis la restaĵojn de alia ĉevalo kaj rajdanto, kiujn la ŝakaloj lasis kaj la suno sekigis ĝis la magreco de maljunaj mumioj. Tiujn ili ankaŭ levis el morto; kaj Mmatmuoro rajdis la velkintan batalĉevalon; do la du magiistoj rajdis antaŭen digne, kiel vagantaj imperiestroj, kun kadavro kaj skeleto por servi ilin. Aliaj ostaroj kaj mortaj restaĵoj de homoj kaj bestoj, kiujn baldaŭ ili trovis, estis simile revivigitaj; do ili kolektis inter si ĉiamŝvelantan sekvantaron dum ilia progreso tra Cincoro.

Survoje, dum ili alproksimiĝis al Jetlireomo, kiu iam estis la ĉefurbo, ili trovis multajn tombojn kaj nekropolojn, netuŝitajn ankoraŭ post multaj epokoj, kun mumioj, kiuj apenaŭ velkis en morto. Ĉiujn ĉi ili levis kaj vokis el sepulta nokto por obei iliajn komandojn. Iujn ili ordonis semi kaj erpi la dezertajn kampojn kaj ĉerpi akvon el profundaj putoj; aliajn ili lasis fari diversajn taskojn, kiajn la mumioj antaŭe faris vivante. La centjara silento estis rompita de la bruo kaj tumulto de miriadaj aktivaĵoj; kaj la magraj kadavroj de teksistoj laboris per siaj navedoj; kaj la kadavroj de plugistoj sekvis siajn sulkojn malantaŭ kadavraj bovoj.

Lacaj pro sia stranga vojaĝo kaj siaj ofte ripetataj sorĉkantoj, Mmatmuoro kaj Sodosmo vidis antaŭ si finfine, de dezerta monteto, la altajn turojn kaj belajn, nerompitajn kupolojn de Jetlireomo, trempitajn en la malheliĝanta stagna sango de malbonaŭgura sunsubiĝo.

“Ĝi estas granda lando,” diris Mmatmuoro, “kaj vi kaj mi kunhavos ĝin inter ni, kaj regos ĉiujn ĝiajn mortintojn, kaj fariĝos kronitaj imperiestroj morgaŭ en Jetlireomo.”

“Jes ja,” respondis Sodosmo, “ĉar neniu vivanta kontestos nin ĉi tie; kaj tiuj, kiujn ni elvokis el la tombo, agos kaj spiros nur laŭ nia diktado, kaj ne povos ribeli kontraŭ ni.”

Do, en la sange ruĝa krepusko, kiu purpure densiĝis, ili eniris Jetlireomon kaj rajdis antaŭen inter la altaj, senlampaj domegoj, kaj instalis sin kun sia horora sekvantaro en tiu digna kaj forlasita palaco, kie la dinastio de Nimbotaj imperiestroj regis Cincoron dum du mil jaroj.

En la polvaj oraj haloj, ili lumigis la malplenajn oniksajn lampojn per sia lerta sorĉado, kaj vespermanĝis reĝajn viandojn, provizitajn el jaroj pasintaj, kiujn ili elvokis en simila maniero. La senkarnaj manoj de iliaj servutuloj verŝis por ili antikvajn kaj imperiestrajn vinojn en lunŝtonajn tasojn; kaj ili drinkis kaj bankedis kaj festis en fantasmagoria pompo, prokrastante ĝis morgaŭ la revivigon de tiuj, kiuj kuŝis mortaj en Jetlireomo.

Ili leviĝis frue, en la malhela karmezina aŭroro, el la luksaj palacaj litoj, en kiuj ili dormis; ĉar multo restis farinda. Ĉie en tiu forgesita urbo, ili iradis tien kaj tien, sorĉante la homojn, kiuj mortis en la lasta jaro de la pesto kaj kuŝis neenterigite. Kaj farinte ĉi tion, ili pasis el Jetlireomo en tiun alian urbon de altaj tomboj kaj fortikaj maŭzoleoj, en kiuj kuŝadis la Nimbotaj imperiestroj kaj la pli gravaj civitanoj kaj nobeloj de Cincoro.

Tie ili petis siajn skeletajn sklavojn enrompi la pordojn per marteloj; kaj tiam, per siaj pekaj, tiranaj sorĉoj, ili elvokis la imperiajn mumiojn, eĉ la plej aĝajn el la dinastio, kaj ĉiuj elvenis rigide, kun senlumaj okuloj, en riĉaj vindaĵoj ornamitaj per flamhelaj juveloj. Kaj poste ili ankaŭ revenigis al ŝajno de vivo multajn generaciojn da korteganoj kaj dignuloj.

En solena procesio, kun mallumaj kaj fieregaj kaj kavaj vizaĝoj, la mortaj imperiestroj kaj imperiestrinoj de Cincoro riverencis al Mmatmuoro kaj Sodosmo, kaj poste sekvis ilin kiel kaptitaro tra ĉiuj stratoj de Jetlireomo. Poste, en la giganta tronĉambro de la palaco, la nekromanciistoj eksidis sur la alta duopa trono, kie rajte la antaŭaj imperiestroj sidis kun siaj edzinoj. Inter la asembleo de imperiestroj, kun

belega kaj funebra aspekto, ili ricevis la suverenecon de la seka mano de la mumio de Hestajono, la plej frua de la Nimbota dinastio, kiu regis en duonmitaj jaroj. Tiam ĉiuj posteuloj de Hestajono, amase pleningante la ĉambron, akklamis per sentonaj, eĥo-similaj voĉoj la regnon de Mmatmuoro kaj Sodosmo.

Tiamaniere la elpelitaj nekromanciistoj trovis por si imperion kaj regatan popolon en la dezerta senfrukta lando, kien la homoj de Tinarato forpelis ilin por perei. Regante absolute super ĉiuj mortintoj de Cincoro per sia malica magio, ili sinistre despotis. Tributon al ili portis senkarnaj portistoj el malproksimaj regnoj; kaj pesto-manĝitaj kadavroj, kaj altaj mumioj parfumitaj per sepultaj balzamoj, iris tien kaj tien por taskoj en Jetlireomo, aŭ amasigis antaŭ iliaj avidaj okuloj, el neelĉerpeblaj keloj, la araneaĵe nigriĝintan oron kaj polvo-kovritajn gemojn de antikva tempo.

Mortaj laboristoj igis iliajn palacajn ĝardenojn burĝoni per delonge pereintaj floroj; kadavroj kaj skeletoj laboris por ili en la minoj, aŭ konstruis belajn mirindajn turojn al la mortanta suno. Ĉambelanoj kaj princoj de malnova tempo estis iliaj tasportistoj, kaj por ravi ilin kordmuzikiloj estis ludataj de la graciaj manoj de imperiestrinoj kun oraj haroj, kiuj elvenis ankoraŭ brilaj el la nokto de la tombo. La plej belajn, kiujn la pesto kaj la vermo ne tro putrigis, ili prenis kiel amatinojn kaj devigis servi ilian nekrofilian volupton.

II

Ĉiel la popolo de Cincoro aktoris la agojn de vivo laŭ la volo de Mmatmuoro kaj Sodosmo. Ili parolis, ili moviĝis, ili manĝis kaj trinkis kiel en la vivo. Ili aŭdis kaj vidis kaj sentis kun simileco de la sentoj, kiuj estis iliaj antaŭ la morto; sed iliaj cerboj estis sklavigitaj per terura nekromancio. Ili memoris nur nebule sian antaŭan ekziston; kaj la stato al kiu ili estis vokitaj estis malplena kaj ĝena kaj ombra. Ilia sango fluis malvarme kaj malvigle, miksite kun la akvo de Leteo; kaj la vaporoj de Leteo nubigis iliajn okulojn.

Mute ili obeis la diktojn de siaj tiranaj mastroj, sen ribelo aŭ protesto, sed plenaj de svaga, senlima laco tia, kian la mortintoj devas scii, kiam trinkinte eternan dormon, ili estas revokitaj al la amaro de mortema ekzistado. Ili sciis nek pasion, nek deziron, nek ekstazon, sed nur la nigran langvoron de sia vekiĝo el Leteo, kaj grizan, senĉesan sopiradon reveni al tiu interrompita dormo.

La plej juna kaj lasta el la Nimbotaj imperiestroj estis Illeiro, kiu mortis en la unua monato de la pesto, kaj kuŝis en sia altkonstruita maŭzoleo ducent jarojn, antaŭ la alveno de la nekromanciistoj.

Levita kun lia popolo kaj liaj patroj por servi la tiranojn, Illeiro rekomencis la malplenan ekziston sen demando kaj sentis nenian surprizon. Li akceptis sian resurekton kaj tiujn de siaj parencoj kiel oni akceptas la indignaĵojn kaj miraĵojn de sonĝo. Li sciis, ke li revenis al paliĝinta suno, al kava kaj fantoma mondo, al ordo de aferoj en kiu li estis nur obeema ombro. Sed unue li, kiel la aliaj, sentis ĝenon nur pro malluma laco kaj pala malsato por la perdita nenieco.

Drogita per la magio de siaj suverenoj, malforta pro la epoklonga nuleco de morto, li vidis, kiel somnambulo, la fiaĵojn faritajn al liaj prapatroj. Tamen, iel, post multaj tagoj, febla fajrero vekigis en la stupora krepusko de lia menso.

Kiel ion perditan kaj nereakireblan, trans vastegaj spacoj, li memoris la pompon de sia regado en Jetlireomo, kaj la oran fieron kaj ĝojegon de sia juneco. Kaj rememorante tion, li sentis nekularan ekmovon de ribelo, fantoman rankoron kontraŭ la magiistoj kiuj alvokis lin al tiu ĉi katastrofa mokaĵo de vivo. Mallume li ekfunebriis pro sia falinta stato kaj la morna misorto de siaj antaŭuloj kaj sia popolo.

Ĉiutage, kiel tasportisto en la haloj, kie li reĝis antaŭe, Illeiro vidis la farojn de Mmatmuoro kaj Sodosmo. Li vidis iliajn kapricojn de kruelo kaj volupto, iliajn kreskantajn ebriemon kaj voremon. Li spektis ilin ĝuaĉi sian nekromancian lukson kaj fariĝi mallaboreme senzorgaj, sinindulge krudaj. Ili neglektis studi sian arton, ili forgesis multajn siajn sorĉojn. Tamen ili ankoraŭ regis, fortegaj kaj imponegaj; kaj kuŝante sur sofoj purpuraj kaj rozaj, ili planis gvidi armeon de mortintoj kontraŭ Tinarato.

Revante pri konkero, kaj pri pli vastaj nekromanciaĵoj, ili iĝis tiel grasaj kaj pigraj, kiel vermoj kiuj ekloĝis en kadavrejo abunda de putraĵo. Kaj paŝon post paŝo kun ilia pigremo kaj tiraneco, la fajro de ribelo kreskis en la ombra koro de Illeiro, kiel flamo kiu baraktas kontraŭ Leteaj humidoj. Kaj malrapide, kun la kresko de lia kolerego, revenis al li iomo de la forto kaj firmo, kiujn li havis en la vivo. Vidante la malmoralecon de la subpremantoj, kaj sciante la malbonon faritan al la senhelpaj mortintoj, li aŭdis en sia cerbo la kriadon de sufokitaj voĉoj postulantaj venĝon.

Inter siaj prapatroj, tra la palacaj haloj de Jetlireomo, Illeiro moviĝis silente laŭ la ordonoj de la mastroj, aŭ staris atendante iliajn komandojn. Li verŝis en iliajn oniksajn tasojn la sukcenajn vinojn, alportitajn per sorĉo el montetoj sub pli juna suno; li submetis sin al iliaj kalumnioj kaj insultoj. Kaj nokton post nokto, li spektis ilin luliĝi en sia ebrieco, ĝis ili ekdormis, ruĝvizaĝaj kaj krudaj, meze de sia arogita grandiozo.

Estis malmulta parolo inter la vivantaj mortintoj; filo kaj patro, filino kaj patrino, amanto kaj amato, iris tien kaj reen sen signo de rekono, sen komento pri sia malbona sorto. Tamen fine, je certa noktomezo, kiam la tiranoj kuŝis dormante kaj la flamoj ŝanceliĝis en la nekromanciaj lampoj, Illeiro interkonsiliĝis kun Hestajono, sia plej aĝa parenco, kiu famis kiel legenda sorĉisto kaj onidire sciis la arkanojn de antikvaj tempoj.

Hestajono staris aparte de la aliaj, en angulo de la ombra halo. Li estis bruna kaj ŝrumpinta en siaj mumio-tolaĵoj; kaj liaj senlumaj obsidianaj okuloj ŝajnis fiksrigardi senmove al nenio. Li ŝajnis ne aŭdi la demandojn de Illeiro; sed post iom da tempo, en seka, susura flustro, li respondis:

“Mi estas maljuna, kaj la nokto de la sepultejo estis longa, kaj mi forgesis multon. Tamen, palpante malantaŭen trans la abismon de morto, eble mi retrovos iom da mia antaŭa saĝo; kaj kune ni elpensos manieron liberiĝi.” Kaj Hestajono serĉis inter la restaĵoj de memoro, kiel iu, kiu etendas la manon en lokon, kie la vermo jam estis kaj la kaŝitaj arĥivoj de pratempo putris en siaj kovriloj; ĝis fine li rememoris, kaj diris:

“Mi rememoras, ke mi iam estis potenca sorĉisto; kaj inter aliaj aferoj, mi sciis la sorĉojn de nekromancio; sed mi ne uzis ilin, abomenante ties uzon kaj la levadon de mortintoj. Mi krome posedis aliajn sciojn, kaj eble inter la restaĵoj de tiu arĥaika sciaro estus io, kio servus por gvidi nin nun. Ĉar mi rememoras malklaran dubindan profetaĵon de la prajaroj, dum la fondo de Jetlireomo kaj la imperio de Cincoro. La profetaĵo estis, ke fatalo pli malbona ol morto trafos la imperiestrojn kaj la popolon de Cincoro en estontaj epokoj; kaj ke la unua kaj la lasta el la Nimbota dinastio, en kuna konsilo, efektivigos liberigan manieron kaj nuligos la missorton. La malbonaĵo ne estis nomita en la profetaĵo: sed oni diris, ke la du imperiestroj ekscios kiel solvi sian problemon per la rompo de antikva argila figuro, kiu gardas la plej suban kripton sub la imperia palaco en Jetlireomo.”

Tiam, aŭdinte tiun profetaĵon de la paliĝintaj lipoj de sia prapatro, Illeiro meditis kelkan tempon, kaj diris:

“Mi nun rememoras posttagmezon en frua juneco, kiam serĉante senokupe tra la neuzitaj kriptoj de nia palaco, kiel knabo faras, mi venis al la lasta kripto kaj trovis tie polvan, krudan figuron el argilo, kies formo kaj vizaĝo estis fremdaj al mi. Kaj, ne sciante la profetaĵon, mi malkontente turnis min for, kaj revenis tiel facilanime kiel mi venis, por serĉi la polvan sunlumon.”

Tiam, ŝtelirante for de sia senatenta parencaro, kaj portante juvelitajn lampojn prenitajn el la halo, Hestajono kaj Illeiro iris suben per subtera ŝtuparo sub la palaco; kaj navigante kiel nedeteneblaj kaŝitaj ombroj tra la labirinto de noktecaj koridoroj, ili venis fine al la plej suba kripto.

Tie, en la nigra polvo kaj noditaj araneaĵoj de pretermemora pasinteco, ili trovis, kiel antaŭdirite, la argilan figuron, kies krudaj trajtoj estis de iu forgesita tera dio. Kaj Illeiro frakasis la figuron per ŝtona fragmento; kaj li kaj Hestajono elprenis el ĝia kava interno grandan glavon el nerustinta ŝtalo, kaj pezan ŝlosilon el senmakula bronzo, kaj tabelojn el hela latuno sur kiuj estis surskribitaj la diversaj faroj plenumendaj, por ke Cincoro liberiĝu de la malluma regado de la nekromanciistoj kaj la popolo regajnu senkonscian morton.

Do, per la ŝlosilo el senmakula bronzo, Illeiro malŝlosis, laŭ la instruoj de la tabeloj, malaltan mallarĝan pordon ĉe la fino de la plej suba kripto, preter la rompita figuro; kaj li kaj Hestajono vidis, kiel estis aŭgurite, la helican ŝtuparon el sombra ŝtono kondukantan al forgesita abismo, kie ankoraŭ brulis la plej subaj fajroj de la tero. Kaj lasinte Illeiron por gardi la malfermitan pordon, Hestajono prenis la glavon el nerustinta ŝtalo per sia velkinta mano, kaj reiris al la halo, kie la nekromanciistoj dormis, kuŝante sur siaj sofoj purpuraj kaj rozaj, kun la palaj, sangangaj mortintoj ĉirkaŭ ili en paciencaj vicoj.

Subtenate de la antikva profetaĵo kaj la prascio de la helaj tabeloj, Hestajono levis la grandan glavon kaj senkapigis Mmatmuoron kaj Sodosmon, per po unu bato. Tiam, kiel direktite, li kvaronigis la restaĵojn per fortegaj battoj. Do la nekromanciistoj fordonis siajn malpurajn vivojn, kaj kuŝadis surdorse, senmove, aldonante pli profundan ruĝon al la rozkoloro, kaj pli helan nuancon al la malĝoja purpuro de siaj sofoj.

Tiam, al siaj parencoj, kiuj staris silente kaj nevigle, apenaŭ rekonante sian liberigon, la estiminda mumio Hestajono parolis per sekaj murmuroj, sed aŭtoritate, kiel reĝo kiu direktas komandojn al siaj infanoj. La mortintaj imperiestroj kaj imperiestrinoj ekmoviĝis, kiel aŭtunaj folioj en subita vento, kaj flustro pasis inter ili kaj pluiris el la palaco, komunikiĝonte finfine, laŭ nerektaj vojoj, al ĉiuj mortintoj de Cincoro.

Tra tiu tuta nokto, kaj dum la sekvanta sango-malhela tago, per balanciĝantaj torĉoj aŭ la lumo de la mortanta suno, senfina armeo de pesto-manĝitaj kadavroj, de ĉifonaj skeletoj, ŝutiĝis en makabra torento tra la stratoj de Jetlireomo kaj laŭ la palac-halo, kie Hestajono staris gardante la mortigitajn nekromanciistojn. Senpaŭze, kun nubecaj senmovaj okuloj, ili iradis kiel pelitaj ombroj, por serĉi la subterajn kriptojn sub la palaco, por trapasi la malfermitan pordon, kie Illeiro atendis en la lasta kripto, kaj tiam por iradi suben laŭ mil mil ŝtupoj al la rando de tiu abismo en kiu bolis la malflusantaj fajroj de la tero. Tie, de sur la rando, ili ĵetis sin al dua morto kaj la pura neniigo de la senfundaj flamoj.

Sed post kiam ĉiuj jam iris al sia liberiĝo, Hestajono plu restis, sola en la paliĝanta sunsubiro, apud la fenditaj kadavroj de Mmatmuoro kaj Sodosmo. Tie, kiel la tabeloj direktis lin, li provis tiujn sorĉojn de antikva nekromancio, kiujn li sciis en sia antaŭa saĝo, kaj malbenis la dismembrigitajn korpojn per tiu eterna vivo-en-morto, kiun Mmatmuoro kaj Sodosmo celis trudi al la popolo de Cincoro. Kaj malbenoj eliris de la palaj lipoj, kaj la kapoj ruliĝis terure kun furiozaj okuloj, kaj la membroj kaj torsoj baraktis sur siaj imperiestraj sofoj makulitaj de solidiĝinta sango. Tiam, sen retrorigardo, sciante ke ĉio estis farita laŭ ordono kaj profetaĵo dekomence, la mumio Hestajono lasis la nekromanciistojn al ilia sorto, kaj iris lace tra la nokteca labirinto de la kriptoj por rekuniĝi kun Illeiro.

Do, en la trankvila silento, sen plua bezono de vortoj, Illeiro kaj Hestajono trapasis la malfermitan pordon de la subtera kripto, kaj Illeiro ŝlosis la pordon post si per ĝia ŝlosilo el senmakula bronzo. De tie, laŭ la helica ŝtuparo, ili iradis al la rando de la profundaj flamoj kaj unuiĝis kun siaj parencoj kaj sia popolo en la lasta, fina nenieco.

Sed pri Mmatmuoro kaj Sodosmo, homoj diras ke iliaj kvaronigitaj korpoj rampas tien kaj reen ĝis eĉ hodiaŭ en Jetlireomo, trovante nek pacon nek ripozon de sia viv-en-morta sorto, vane serĉantaj tra la nigra labirinto de subaj keloj la pordon, kiun ŝlosis Illeiro.

Nota: Tiu ĉi rakonto, tradukita de Russ Williams, ankraŭ atendas aldonon de la vortaro. Tion aldonos la redaktoro post ioma tempo. Ni petas, ke vi pardonu la intertempon.

Atribuoj

La subaj homoj kontribuis al tiu ĉi traduko, ĉiuj en diversaj tempoj kaj lokoj. Kie mankas indiko pri lando, tio okazis en Usono.

Verkis:

Clark Ashton Smith (1893–1961)
Anglalingva titolo: *The Empire of the Necromancers*

Permesis:

Dank al William A. Dorman, la literatura postlas-ekonomo Clark Ashton Smith.

Tradukis:

Russ Williams

Ilustris:

Richard Svensson — *Svedio (la kovrilon)*

Kontrolis:

Mariusz Hebdzyński
Anina Stecay
Anna Skudlarska.

Se vi havas ajnajn komentojn, bonvolu kontakti la redaktoron epoŝte laŭ la jena adreso: gan@starling.us

he Empire of the Necromancers © 1932 by Clark Ashton Smith. © by CASiana, the literary estate of Clark Ashton Smith.

Translated with permission.



Tiu ĉi Esperanta traduko pri *The Empire of the Necromancers* verkita de Clark Ashton Smith estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce-Nemodifite 4.0 Tutmonda.

Katalogo de Senpagaj Bitlibroj

<http://esperanto.us>



Jack Vance

romanoj

Mazirien la Magiisto

Klasika serio, *La Mortanta Tero*, volumo unu. Ses interligitaj noveloj pri la fintempo de la Tero, kiam magio superas ol scienco post ol la luno delonge malaperis kaj eĉ la suno mem ŝvelas ruĝe montante makulajn signojn de baldaŭa mallumiĝo.

Kugel La Ruza

Klasika serio, *La Mortanta Tero*, volumo du. Sep sin-sekvaj noveloj formantaj la duan volumon el la serio 'La Mortanta Tero'. Rakontaro en kiu humore kruelea magiisto devigas friponan anti-heroon al grandega aventuro ĉe la fora flanko de l' mondo por plenumi nefareblan mision La aventuroj de Kugel la Ruza iom ŝokas kaj tre amuzas, ambaŭ samtempe.

Kugel: la Ĉielorompa Ŝpruclumo

Klasika serio, *La Mortanta Tero*, volumo tri. Dek tri sin-sekvaj noveloj formantaj la trian volumon el la serio 'La Mortanta Tero'. La dua aventurogo de Kugel la Ruza, ĉifoje komencanta per ŝipo.

Jack Vance

noveloj

Trigamba Joĉjo

Sur planeteto senaera du junuloj alfrontas beston nevenkeblan.

La Luna Sfingo

En kulturo kie ĉiuj portas maskojn, ĵus alveninta diplomato ĉasas murdiston.

Domo de l' Se

Post respondi al reklmao pri aventuro, viro ekfrontas multon pli ol atendite.

Retretejo Ulvarda

Kiam surtere estas 50 miliardoj da homoj, ĉu izoleco dezirindas pli ol ĉio?

Kiam la Kvin Lunoj Leviĝas

Sur planedo havanta kvin lunojn, oni povas fidi pri nenio ajn tiam, kiam la kvin leviĝas samnokte.

Clark Ashton Smith

noveloj

Genius Loci

Terura novelo pri ege malica energio kiu hante loĝas en marĉa lageto havanta skelete mortintan salik-arbon.

La Imperio de la Nekromanciistoj

Terura novelo pri du nekromanciistoj kiuj resurektigas armeon el mortintaj ostoj cele por venĝi sin kontraŭ la urbo kio estis pelintaj ilin en tiun saman dezerton.

CAS-bitlibroj laŭplane eldonotaj

La Urbo de la Kananta Farjo

La Sorĉado de Ulua

La Rakonto de Satampro Zejroŝ

La Malhela Fantomo

La Duobla Ombro

Clifford D. Simak

romano

Stacidomo

Ricevinto de la Premio Hugo en 1964. Scienc-fikcia romano pri inter-planedaj rilatoj kaj konfliktoj en tut-glakasia societo.